

Mensuel
Numéro 61
Janvier 2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

Kulturcentroj en Francio : iuj sonorigas alarmon !

Ĉu vera danĝero, ĉu ĉantaĝo, ĉu troa timemo, ĉu... ?
Kia estas la reala situacio ?

diskutenda temo ! (vidu p. 3)

ie, iam, en la (tuja?) estonteco...



Plej malfavora konjekto...

Vortoj de la eks-kasisto

Kiam, dum la jaro 1974, la antaŭa kasisto de SAT-Amikaro André Delaye (Miketo por la konatuloj) transdonis al mi la kontlibrojn de la asocio, mi tute ne antaŭvidis ke mi restos dum 35 jaroj kasisto de SAT-Amikaro! La tempo forflugas ege rapide! Dum tiu longa tempo, multaj geamikoj trapasis en la komitato, kaj mi eĉ konis tri prezidantojn: Roland Grandière, Jean Selle kaj Dominique Simeone.

Dum tiu periodo, la asocio devis fronti al multaj problemoj, inter kiuj la klopodoj ĉe la fisko por akiri la statuson de nekomerca asocio por ne pagi la «TVA»-n sur la vendo de niaj libroj, nek imposton sur nia eventuala profito. Same longaj klopodoj apud la «Commission Paritaire» por akiri kaj poste konservi la favoran poŝtan tarifon por la sendo de nia revuo.

Ankaŭ aĉeto kaj translokiĝo al nia nova sidejo pli taŭga ol la kunloĝado en la SAT-sidejo.

Ne ĉiam estis facile esti kasisto de SAT-Amikaro, sed mi tamen

fieras, ĉar dum tiu longa tempo, mi ĉiam tenis firme la kason de la asocio, eĉ tro firme laŭ opinio de kelkaj!

Mi ankaŭ deziras danki la membrojn, kiuj ĉiam fidis al mi kaj aprobis miajn kontojn. Mi esperas ke ili tiel fidos kaj subtenos nian novan kasiston Guy Martin al kiu mi deziras multe da sukceso kaj bonan kuraĝon en lia malfacila tasko.

Kompreneble, mi ne forlasas la asocion. Mi ĉiam restos aktiva membro, daŭre vizitos la sidejon kaj volonte helpas la komitaton, se necesas.

**La tro longtempa kasisto :
André Sadier**



Saluton esperantistaj geamikoj!

Ĉu vi memoras ke grupeto da persistemaj bretonaj esperantistoj donis rendezuon al vi de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo 2010 en Hiliono, bretona vilaĝeto situanta proksime de San-Briego en norda Bretonio? Kune ni diskutos pri la rimedoj por kriz-kontraŭi. Por tio,

alterne kun la debatoj pri la funkciado de SAT-Amikaro, ni paŝos en la paŝoj de loka verkisto Louis Guilloux alnomita « la nesubigito » por pripensi kaj debati pri aktualaj problemoj: la kvalito de akvo en Bretonio kaj aliloke, la estonteco de la abeloj, la ekonomikaj socialaj krizoj.

Kriz-kontraŭi estas ankaŭ kune ĝui: por tio, ni vin inicos al la bretonaj dancoj kaj kantoj vespersabate (certe bonhumore), ni plenpartoprenos en emocioj aŭskultante la vesperkoncertojn dimanĉe (klasika gitaro kaj la Ĝenerala Kanto per la e-a ĥoro Interkant') kaj lunde (piano kaj muzika komedio).

Kaj kompreneble ni ne lasos vin foriri sen malkovrigi al vi kelkajn belajn lokojn de nia regiono: San-Briegaj golfeto kaj urbo, *Dinan* kaj ĝiaj remparoj, la valo de *Rance*, la roza granita marbordo, la kastelo de *la Roche Jagu* kajvera gaŭla vilaĝo, ĉio ĉiam bonhumore.

Ĉu vi jen estas konvinkitaj pri la neceso partopreni en tiu evento? Do rapide reprenu la 60-an numeron de «La Sago» kaj urĝe sendu vian aliĝilon, se ne jam farite.

OKK-Armor 2010



Alvoko al Esperanto-asocioj

La du kulturaj esperantaj centroj en Francio travivas grandajn malfacilaĵojn. De kelkaj jaroj, ili frontas almenaŭ unu similan problemon: malkresko de la partoprenantoj en la staĝoj.

Konsekvence, krom ĉiama almozpetado, ili ne plu povas efike prizorgi siajn bienojn.

Venas tempo por ke ĉiu grava franca Esperanto-asocio sin demandu:

Ĉu por Esperanto kaj por nia asocio, pluvivo de tiuj centroj gravas?

Se jes, kiel nia asocio povos helpi la kulturajn centrojn? (partopreni en

administrado, organizi staĝojn aŭ renkontojn, kunredakti projekton pri estonteco, ktp).

Tiun alvokon ni sendos al koncernaj asocioj, gazetoj por ke multaj esperantistoj ĝin transdonu, ĝin debatu kaj asocioj respondu la demandojn.

Ni petas de ĉiuj esperantistoj, kiuj konsentas kun nia alvoko, ĝin subskribi.

Unuaj alvokantoj:

Guy Martin, ekskomitatano de la kulturdomo de Greziljono.

Xavier Godivier, komitatano de la kulturdomo de Greziljono

Claude Trésorier, komitatano de la kulturdomo de Greziljono

Jannick Huet, komitatano de la kulturdomo de Greziljono

Bert Schumann, konsilanto de la kulturdomo de Greziljono

Denis Serge Clopeau

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
- & 3 Alvoko al Eo-asocioj
Esp Franciaj Kulturcentroj
- 2 Vortoj de la eks-kasisto
Saluton OKK
BildDeliraĵo: Ĉe la lago 61
- 4 Obocko
Selle-Humuraĵoj
- 5 Louis Guilloux
- 6 Kongreso : Prelegoj
Kiu estas G. Palante ?

Supplément en français

- 7 Georges Palante
- 8 Cours/Stages Lorraine
- 9 Google et Zamenhof
- 10 Congrès SAT-Amikaro
- 11 Utilaj informoj
- Kiel traduki: Façon
- 12 Libro-Servo
- 13 Libro vivas pli ol unu sezono: Karuseloj...
- 14- Esperantistoj aktivas
- 15
- 15 Vagado sur la rozgranita
- 16 marbordo

Esperantaj kulturcentroj: de gramatikaĵoj al praktikaĵoj.

Dum la pasinta agadaro aparte malabundis la vizitantoj en la du kulturcentroj de Francio, t.e. Greziljono kaj Kvinpetalo. En novembro disvastiĝis la alvoko, kiu legeblas ĉi supre. Laborgrupa kunveno pri tiu ĉi temo estas antaŭvidita dum la venonta SAT-Amikara kongreso. Jen do kelkaj ideoj, por eknutri la preparan debaton.

Memstaraj, sed ne sendependaj, nek senefikaj

Eĉ se jure sendependaj, el praktika vidpunkto la kulturcentroj estas nur memstaraj, ĉar ili dependas de la ĉirkaŭa kunteksto, aparte de la stato de la Esperanto-movado. Memevidente, kulturcentro en mondregiono, kie la esperanta movado dormetas, ne povas tre vigli, ĉar la nombro de vizitantoj dependas, eĉ se nerekte, de la nombro de homoj, kiuj ĝustatempe ricevos informojn pri la staĝoj, kaj de la kongruenco inter la staĝoprogramo kaj la bezonoj de la esperantistaro. Reciproke, la ekzisto de tiuj centroj havas flankajn efikojn por la tuta esperantistaro. Tiuj flankaj efikoj ĝenerale ne estas enkalkulitaj en la financaj bilancoj de la koncernaj asocioj.

La plialtiĝo de la lingvonivelo de la ĉeestantoj kaj la kontaktiĝo de esperantistoj el diversaj regionoj, kiuj tie starigas aŭ pridiskutas projektojn plenumotajn alikadre verŝajne estas la du ĉefaj tiuspecaj flankefikoj. Tial la esprimo «ĉiama almozado» por priskribi la nunajn vokojn al financa subtenado ŝajnas al mi malĝusta. Fakte, dum tiuj centroj relative bone funkciis, la cetera movado profitis el ili, kaptante kompetentajn aktivulojn,

ĝuante senpagajn laborgrupajn kromkunvenojn, kaj disvendante siajn eldonaĵojn. Se nun tiuj centroj troviĝas en situacio, kiu postulas pli grandan energistreĉon favore al ili, ĝi pli devus esti perceptata kiel reciproka subteno - eĉ investo por la estonteco - ol kiel malŝpara almozado.

Praktikaj problemoj solvendaj

La ĉefaj malfacilaĵoj fontas el malnoviĝo de la ejoj, kiuj necesigas riparojn kaj adaptiĝon al pli kaj pli postulemaj normoj. Sed frontado de tiaj problemoj en si mem havas klerigan valoron. Ofte estas plendoj, ke Esperanto pli utilas por disertacii pri beletraĵoj ol por pritrakti konkretajn ĉiutagaĵojn. Sed kio estas pli konkreta temo ol liko en tegmento aŭ inundo en kuirejo? Samon eblus diri pri la interhomaj streĉoj, kiuj foje naskiĝas el ĉi tiuj situacioj. Ĉu Esperanto do estas lingvo uzenda nur okaze de «plene sukcesaj» - sed kvazaŭ eksterteraj - aranĝoj, aŭ ĉu ĝi uziĝu ankaŭ en pli kaĉaj - sed almenaŭ realaj - cirkonstancoj?

Krome la centroj ne ŝvebas en la aero, sed estas ĉirkaŭitaj de neesperantistaj instancoj kaj individuoj, kun kiuj plimalpli intimaj rilatoj plektiĝis. Varbado estas ofte perceptata kiel predikado aŭ disdonado de flugfolioj. Sed imagu la varban efikon se neesperantistoj subite konstatus, ke esperantistoj kapablas ankaŭ venki konkretajn malfacilaĵojn.

Kiel helpi?

Parto el la nunaj problemoj fontas el manko de homfortoj en la regionoj, kie troviĝas la centroj. Sed ĉu SAT-Amikaro

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Louis	Gohin
Bruno	Henry
Stéphane	Lemarchand
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Guy	Martin
Laurent	Peuch
Jeanne	Pouhaer
André	Sadier
Frederiko	Scibor
Jean	Selle
Philippe	Stride
Sergo	Sir'
Amapola	Triguero

ne povus uzi la okazon, por klopodi plifortigi sian membraron prioritare en ĉi tiuj regionoj?

Alia maniero por malpezigi la laboron de la lokaj prizorgantoj estus aktiva helpado por starigo de la staĝoprogramoj, kun temoj «movade utilaj», kaj ne nepre «strikte kulturaj».

Vinko Markovo

Obocko aŭ somerrestado en Ĝibutio.

Serĉi en librovendejo, kiam oni multe ŝatas la librojn, ofte estas okazo por malkovri en la brokantskatolo, veran, neatenditan trezoron. Tiel, promeninte en la Avenuo de Italio, mi povis aĉeti romanon kiu rakontas tiun reaperon de pasinta historia epizodo en Tunizio, kiam tiu lando gastigis la « Bataillons d'Afrique » aŭ « Bat'd'Af », en Tatauino (Tataouine). Temis pri vera bagno en kiu vivis militistoj neakcepteblaj en kutimaj regimontoj. Neniu daŭro pri la puntempo estis difnita kaj la vivokondiĉoj estis teruraj. Homoj fariĝis frenezaj aŭ sin mortigis.

Mi trovis libron verkitan far Georges Darien: «Biribi», kiu parolis pri tiuj elĵetuloj.

Post la Hinduĉina kaj Alĝeria militoj, dum la jaroj 1960 -1974, iuj oficiroj, suboficiroj, kaj eĉ ranguloj estis mense nereadapteblaj. La hierarkio ne sciis kion fari aŭ kie havigi al ili postenon. Tiuj militoj lasis spurojn tiel ke ili ne povis adaptiĝi.

La ministerio pri Nacia defendo eltrovis solvon -laŭdire- sed vere aĉegan. Necesis starigi ŝajnan disciplinan batalionon en Ĝibutio ĉe la «Ruĝa Maro», en la bivako de Obocko(Obock), meze de regiono preskaŭ dezerta, sub varmega suno (30 ĝis 40 gradoj).

La problemoj de la kadruoj estis, tiel, findecidita. Pri la solvo de la armeano, kial cerbumi? En la malliberejoj, estis junuloj kiuj atingis la aĝon por militservi ĉe la fino de siaj punoj taŭgis por konsistigi trupon.

Sufiĉis al la «DST» aŭ aliaj militistaj policistoj, per oficiala dokumento, iri surloken por forpreni tiujn junulojn, kaj poste, sen antaŭaverti la familiojn, mankatenitaj, veturigi ilin, mankatenitaj, aviadile, en Ĝibution kaj poste al Obocko.

Mi aĉetis la libron «Malitorne», verkitan de Pierre Devey -eldono «Carnot-France» 10 quai Jean Mermoz-78400 Chatou. Mi skribis al la aŭtoro kiu konsilis al mi iri ĉe la militistaj arkivoj en Vincennes. «Malitorne» estas romano, sed la aŭtoro, ekkonis junulon renkontitan en malliberejo kiu rakontis al li la propran restadon. Do, temis pri realaj faktoj, kuelegaj kun seksperfortoj fare de sadistoj: ĉu oficiroj, ĉu suboficiroj, ĉu ranguloj. Plendi al iu estis vana - draŝadoj por sankcii- puniradoj dum la nokto.

Ofte, estis memmortigoj. Tiuj fiuloj revis revivigi la periodon de «Tatauino». Eble, dum tiu epoko, temis pri kondamnitoj

de milittribunaloj, sed pri tio, temis pri fortega povo- troigo, organizata samtempe de la nacia defendo, justicministro kaj ministerio pri internaj aferoj, finfine, estis kolektiva malbrava ago sen pravigo kontraŭ junuloj. Ni volus koni la kaŭzojn de la frenezo koncerne ulojn.

La verkisto Romain Gary (1970) en sia libro (Enfer au bord de la mer Rouge) priskribis tiun lokon je kelkaj kilometroj de la regiono por la sklavovendistoj, dum la periodo kiam Monfreid kaj Kessel entombigis, en la varmega sablo, knabojn kastritajn por pli rapide cikatriĝi.

La vundoj de tiuj estontaj eŭnukoj destinitaj por la haremoj en Arabio, staras malantaŭ pikdratoj, la disciplina bivako kie daŭrigas la celebrado de morbidaj edziĝoj, kie la gusto de la fizika puno akirita foje akordiĝas kun la sufero trudita. «Les Joyeux» vi vidos ilin dum kelkaj sekundoj da Historio, tiujn fantomojn tre vivantajn, aperitajn el forvaporizita mondo.

La «bat'd'af»! ĉie estas disciplina infero por la «obstinaj kapoj», kie nur mankas «Papillon» por rememorigi al vi la bagnon de Gujano kaj kie la sadismo de la punestroj faras tre bonan mastrumadon kun la masĉismo de la punuloj.

Tiu infero daŭros preskaŭ 10 jarojn. Post informoj de la supra komandejo, militista kuracisto, subkolonelo, estis delegita al Obocko (Obock). La provo de forkuro de kelkaj soldatoj kaŭzis neimageblajn perfortaĵojn. Tio estis tombofosoj en kiuj ili devis kuŝi dum frostega nokto.

La subkolonelo estis malbone traktita de la kampestro, ĉar li konstatis kun hororo malbonan higienon, pri la manĝaĵo, la kazernoj, kaj precipe la malbonan sanstaton de la soldatoj dum la kadroj ŝajnis ne tro suferi.

Reveninte en Francion, li sendis raporton al ministro pri nacia defendo, kiu tion transdiris al prezidento Giscard d'Estaing, kiu decidis ke tiu somerrestado longtempe miskonata estu definitive fermita.

Se ekzistis legendaĉo pri Tatauino «Tataouine», la silento pri tiu kampo estis(estas)ĉioma, por elsavi la reputacion de la «Granda Mutulino».

Nun, post la « Bat'd'Af» Obocko estas nur la bazo de la fremdula legio...fina punkto.

Louis Gohin .

Eksporta-importa komerco

Usono eksportas en Afganion freŝajn soldatojn kaj importas heroojn kaj heroinon

Jen sensacia novaĵo por mia gazeto: la komerco proksimigas la homojn



Selle humuraĵoj



La okcidenta civilizacio en Afganio.

Imagu la profiton, kiun vi povus eltiri el via edzino, pere de la surfaco de ŝia vesto !



Hipokratano aŭ hipokritulo?

Mi bedaŭras... La doktoro estas alerga al la mizero !



Louis Guilloux, verkisto

Ĉi teksto jam aperis franclingve en *La Sago 60*, en la franclingva suplemento.

De modesta deveno, lia patro estis ŝuriparisto, Louis Guilloux vivis en San-Briego dum sia juneco. Impresis lin la spektaklo de multaj vundintoj de la unua monda milito, transportitaj en tiu urbo fora de la fronto por provi kuraci ilin.

Malsaniĝema, li tamen sukcesis daŭrigi liceajn studojn kaj obtenis prigrardistan postenon kiu havigis al li iun financan memstarecon. Li tiam interkonatiĝis kun *Jean Grenier* kaj la filozofo *George Palante* kiu inspiris al li kortuŝan rolon de *Cripure* en sia romano *Le Sang Noir*. En 1918, li foriris al Parizo kie li vivis dank' al necertaj laboretoj, el kiuj ĵurnalismo. Li praktikis pli daŭre tradukistan profesion de anglaj gazetoj, kaj poste de anglaj kaj usonaj romanoj.

Li vizitadis beletran medion en Parizo (*Max Jacob*, *André Chamson*, *Jean Guéhenno*, *André Gide*, poste *André Malraux*) kaj decidis sin dediĉi al beletro. Li publikigis *La Maison du Peuple* en 1927, verkon en kiu li priskribis la vivadon kaj esperojn de San-Briega proletaro (esperante tradukita en 1999: «La Domo de la Popolo»).

En 1928, li foriris al *Angers* kie lia edzino estis nomumita kiel fakinstruistino pri franca lingvo.

De la jaroj 1930, antaŭ faŝisma ampleksiĝo, li pli ofte partoprenis en politikaj kaj sociaj aktivecoj.

Post reveno al San-Briego, li partoprenis

en kampanaj luktoj en la jaroj 33/34 kontraŭ bienaj vendokonfiskoj kaj subtenis movadojn favore al senlaboruloj. Kiel kontraŭfaŝista intelektulo, li iĝis sekretario de internacia verkistkongreso. Poste, li partoprenis la organizadon de Ruĝa Internacia Helpejo kiu helpis homojn fuĝantajn pro faŝismaj reĝimoj. Lia ĉefverko «*La Nigra Sango*» aperis en 1935.

En 1936, li akompanis *André Gide*-n en Sovetio; li rifuzis deklari sin kontraŭ *Gide* pro kritikoj de la soveta reĝimo, malgraŭ premo de la Komunista Partio. En la sino de San-Briega Popola Helpejo, li organizadis ekde 1937, helpon por la hispanrifuĝintoj sekve de avancado de frankismaj trupoj en Eŭskio.

Dum la germana okupacio, li loĝis en San-Briego, verkante «*Le Pain des Rêves*». Dum li kontaktadis lokajn retojn de Rezistado. (Lia domo estis traserĉita kaj juna rezistantino estis arestita de franca Milicio.)

Je la Liberigo, li estis elektita kiel interpretisto ĉe la usona armeo: li ĉeestis militan proceson kaj perceptis rasismon kiu regis en ĝi (temo de la libro «*O.K Joe!*» eldonita en 1975). Li ekkonis *Albert Camus*-n kun kiu li amikiĝis.

En 1949, aperis «*Le jeu de patience*» kiu ricevis la *Renaudot* premion.

La sekvantajn jarojn li daŭrigis verki kaj publikigi, adaptis verkojn al teatro kaj

televido.

Dum la eventoj de Majo 68-a, li restis lojala al siaj ideoj apogante la studentajn manifestaciojn kaj poste la strikantojn de grava uzino *Le Joint français*.

La volumo 1 de *Carnets* aperis en 1978, la 2a volumo post lia morto.

Louis Guilloux naskiĝis kaj mortis en San-Briego (1899-1980)

Por scii pli:

Novaĵoj:

2007: eldono *Gallimard* «*L'interprète*» verkita de la usona historiistino *Alice Kaplan*, subtitolita: *Dans les traces d'une cour martiale américaine (Bretagne 1944)*.

2009: eldono *Gallimard* volumo titolita: «*D'une guerre l'autre*» entenante:

La Maison du peuple (antaŭparolo: *Albert Camus*)

Compagnons (antaŭparolo: *Albert Camus*)

Le Sang noir (antaŭparolo: *André Malraux*)

Douze balles montées en breloques *O.K Joe!*

Labyrinthe

L'herbe d'oubli

DVD «*Louis Guilloux l'insoumis*»

Dokumento-filmo reĝisorita de *Rolland Savidan* kaj *Florence Mahé*

El la kongres-programo prelego

Louis Guilloux l'insoumis

Louis Guilloux la nesubigita


Dokumento-filmo «*Louis Guilloux l'insoumis*» ricevis laŭdajn kritikojn en gazetaro kiu rimarkigis aktualecon de pensado kaj verkaĵo de «*Louis Guilloux*» en nia 21-a jarcento.

Rolland Savidan kaj Florence Mahé, kunprodukte de la «*Société des Amis de Louis Guilloux*», registris atestojn de ĉiuj kiuj konis kaj apudvivis Louis Guilloux-n ĉu en San-Briego, ĉu en Parizo. Louis

Guilloux verkisto, engaĝiĝa kontraŭ la suferoj kaj maljustaĵoj, fidela amiko de Max Jacob, Jean Grenier, Albert Camus, André Malraux, Jean Daniel kaj multaj aliaj.

Sekvos la dokumento-filmo de 70 min, debato kun la «*Société des Amis de Louis Guilloux*»; tiu kongresa ero france disvolviĝos ĉar ĝi estos malfermita al la publiko.

Sabaton la 3an de aprilo 2010 de 14a ĝis 16a



El la kongres-programo Aliaj prelegoj

Ni krizkontraŭu !

Kia socia organizado por estonteco ?

Evoluo kaj proponoj.

Ni invitas la kongresanojn debati pri tiu temo. Laŭ pluraj vidpunktoj, François Bartsch, Cyrille Hurstel kaj Bernard Lagrange klarigos evoluon pri ĉiuj krizoj: ekonomiaj, financaj, klimataj, sociaj, ... Ili sugestos elirvojojn por ke ni konstruu optimisman estontecon nin apogante sur alternativaj konkretaĵoj .

Cyril Hurstel, François Bartch, Bernard Lagrange

Dimanĉon la 4an de aprilo 2010/ 17h

Akvobatalo en Bretonio

«Akvo kaj Bretonaj Riveroj» estas asocio kreita de salmokaptistoj kaj natursciencistoj maltrankvilaj pro malapero de tiu belega fiŝo el bretonaj riveroj.

Poste, la asocio plilarĝigis sian agadon kaj sian pensadon al ĉiuj problemoj pri administrado kaj protektado de akvo kaj naturaj medioj, de fonto ĝis maro.

Asocio «Akvo kaj Bretonaj Riveroj»

Libera de politika, sindikata kaj konfesia apartenado, la asocio agas en la kvar bretonaj departementoj, en Maniko kaj en Atlantika Luaro, helpata de skipo (dekkvino da konstantuloj) kaj centoj da aktivuloj. La asocio estas ankaŭ helpata da miloj da aliĝintoj kaj kunigas centeton da lokaj asocioj dissemantaj en granda okcidento.

Lundon la 5an de aprilo 2010 je la 14-16a

Abeloj en danĝero: atesto de du abelbredistoj.

La abeloj kunhelpas en la fekundiĝo de 80 % de la florvegetalaj specioj: ili estas do ega apoganto en ekvilibra daŭrigo de ekosistemoj kaj de nia agrikulturo.

Nu, en Eŭropo, 30 % ĝis 40 % de la abelkolonioj pereis dum malpli ol dek jaroj.

Dum mallonga prelego, sekvota de debato, Luc Gouverneur (Loire Atlantique) kaj Maja (Côtes d'Armor), provos klarigi la kialojn de tiu malapero, kaj proponos kelkajn solvojn.

Maja esperante prelegos lundon 5an de aprilo 2010/ 16-17 h 30

Ĉirkaŭ la kongreso de Hiliono

La kultura centro de Hiliono estas dediĉita al li :

Kiu estas *Georges Palante*?

La filozofo de la batalo por la individuo

Georges Palante naskiĝis la 20-an de novembro 1862 en Kalezio (*Dép. Pas de Calais*), kaj mortis en Hiliono (Armoraj Marbordoj) la 5-an de aŭgusto 1925.

Restinta sola filo (unuenuaskita frato mortis kelkajn tagojn post sia naskiĝo) de *Thérèse Tricot* kaj *Emile Palante* devenaj de Belgio. Lia patro praktikis diversajn laboraktivaĵojn: fandisto, vino- kaj brando-vendisto, kontisto, poste agrikultur-maŝin-fabrikisto.

Post bonegaj studadoj, kiel stipendiulo de la mezlernejo de *Arras* ĝis la liceo *Louis Le Grand* en Parizo kaj la universitato de *Douai*, li sukcesis licencion pri literaturo (1883), kaj agregacion pri filozofio (1885). En la aĝo de dudektri jaroj, li obtenis postenon de supera instruisto de filozofio en *Aurillac* kie li interkonatiĝis kun *Louise Genty*. Ili geedziĝis la 28-an de aŭgusto 1887, kaj eksgeedziĝis tri jarojn poste. Ili havis nur unu filinon *Germaine*

Post instruado en diversaj urboj en Francio, li instruis en liceo de San-Briego de 1898 ĝis 1925. Ĉi tie, li interkonatiĝis kun tiama juna fraŭlo *Louis Guillaux*.

Li ekpublikigis artikolojn kaj filozofiajn eseojn *Précis de Sociologie*, *Combat pour l'individu...*

En 1907, li konstruigis etan domon en Hiliono, proksimume 12 km for de San-Briego, en la marborda vilaĝo de *La Grandville*. Ĉiujare dum la ferioj li iris ĉi-tien. La forveturo por Hiliono ĉiam estis vera ekspedicio. Necesis vojaĝi per eta vagonaro de San-Briego ĝis la vilaĝeto *les Aubiers*. Tie atendis lin la najbaro kun sia azeno kaj kariolo. Tiun saman jaron, li preparis doktoriĝan disertaĵon, sed alfrontis profesorojn de Sorbono, majstroj de klasika filozofio, kiuj kontraŭstaris kaj refuzis ĝin. Poste, li publikigis tiun verkon sub la titolo *Antinomies entre l'individu et la société*, kompletigita de *Pessimisme et individualisme*. Dum la 13 sekvintaj jaroj *Palante* dediĉis sin al filozofia kroniko en la revuo *Mercure de France*.

Pli kaj pli solecaj iĝis liaj lastaj jaroj : li malamikiĝis kun sia malnova miko *Jules de Gaultier*, emeritiĝis, edziĝis

kun *Louise Pierre* sia analfabeta kunulino kiu prizorgis lin, por garantii al li renton.

Li sin mortigis pafe en 1925, en sia domo de *la Granville* en Hiliono fronte al spegulo.

Laŭ sia vivo kaj tragika fino, *Georges Palante* estis filozofo malbenita kiel la romantikaj poetoj.

Suferinte denaskan kriplaĵon, akromegalion, *Palante* kumulis malsukcesojn en sia persona vivo (eksedziĝon, malsanon, solecon), profesia (rifuzon de lia doktoriĝa disertaĵo, li estis ridindigita de lernantoj), kaj publika (sensukcese li prezentigis je balotoj).

Louis Guillaux inspiriĝis el la filozofia profesoro *Georges Palante*, por krei la rolulon de *Cripure* (alnomo donita de ŝercaj liceanoj laŭ la reduktita formo de *Critique de la Raison Pure*), patosa heroo kun burleska aspekto en *Le Sang Noir*.

Tamen liaj filozofiaj verkoj ne malaperis en forgeson: li enlistiĝas en la idaro de la Individuistoj. Influita de *Stendhal*, *Nietzsche* (Niĉeo), *Freud* (Freŭdo), li siavice havis influon ĉe *Jean Grenier*, *Albert Camus* kaj nuntempe *Yves Prié* kaj *Michel Onfray*.

(*Physiologie de Georges Palante, portrait d'un nietzschéen de gauche -Grasset-2002 kaj en poŝlibro en 2005*)

La ĉefaj verkoj estis reeldonitaj freŝdate de *Yves Prié* (eldonisto: *Folle Avoine*)

En 2004 la eldonisto *Coda* publikigis *Oeuvres philosophiques* la preskaŭ kompletajn verkojn kun prefaco de *Michel Onfray*.

Ankaŭ la kronikojn de la Revuo *Mercure de France* estis reeldonitaj en 2006 kaj 2009 de *Coda*

La sensibilité individualiste haveblas ĉe la eldonisto *Mille et une nuits*.

Por scii pli

<http://pagesperso-orange.fr/selene.star/>

<http://www.espacestemp.net/document1793.html>

Franjo, Laurent, Amapola, MarieMad

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Congrès SAT-amikaro 2010, Hillion (Côte d'Armor)

<http://kongreso2010.sat-amikaro.org>

L'espace culturel d' Hillion porte son nom:

Qui est Georges Palante?

Le philosophe du combat pour l'individu

Georges Palante, est né le 20 novembre 1862 dans le Pas-de-Calais et mort à Hillion (Côtes d'Armor) le 5 août 1925.

Fils unique (un frère aîné meurt quelques jours après sa naissance) de Thérèse Tricot et d'Emile Palante originaires de Belgique. Son père a exercé des activités diverses: fondeur, marchand de vin et d'eau de vie, comptable, puis constructeur de machines agricoles.

Après de brillantes études, en tant que boursier, au collège d'Arras, via le lycée Louis Le Grand et l'université de Douai, il est licencié en littérature (1883) et obtient l'agrégation de philosophie (1885).

A l'âge de 23 ans il obtient un poste de professeur de philosophie à Aurillac où il fait connaissance avec Louise Genty.

Ils se marient le 28 août 1887, et divorcent trois ans plus tard. De leur courte union naîtra leur fille Germaine.

Après avoir exercé dans différentes villes de France, il enseigne au lycée de St Brieuc de 1898 à 1925. Il y fait la connaissance de Louis Guilloux jeune homme.

Il commence à publier des articles et essais philosophiques: *Précis de sociologie, Combat pour l'individu...*

En 1907, il se fait construire une petite maison à Hillion à 12 km de St-Brieuc, au village de la Grandville en bord de

mer. Il s'y rendra chaque année pendant les vacances scolaires. Le départ pour Hillion était toujours une véritable expédition. Il fallait d'abord prendre le petit train de St Brieuc et descendre au lieu-dit «les Aubiers»; là un voisin l'attendait avec son âne et une carriole.

Cette même année, il prépare une thèse d'Etat mais se confronte aux professeurs de la Sorbonne, maîtres de

la philosophie classique, qui lui opposent un refus. Il publiera, plus tard, ce travail sous le titre *Antinomies entre l'individu et la société* complété par *Pessimisme et individualisme*.

Palante se consacre ensuite pendant 13 ans à tenir une chronique philosophique dans la revue «Mercur de France».

Ses dernières années sont de plus en plus solitaires:

il se brouille avec Jules de Gaultier, prend sa retraite d'enseignant, se marie avec Louise Pierre, sa compagne illettrée qui prenait soin de lui, pour lui assurer une situation.

Il se donne la mort en 1925 dans sa maison de la Granville à Hillion d'une balle dans la tempe face à un miroir.

Par sa vie et sa fin tragique, Georges Palante fait figure de philosophe «maudit» à la manière des poètes romantiques.

Souffrant d'une maladie congénitale invalidante, l'acromégalie, il a cumulé les échecs dans sa vie personnelle (divorce, maladie, solitude) professionnelle (refus de sa thèse, il est moqué et incompris par ses élèves) et publique (il s'est présenté sans succès aux élections).

Louis Guilloux s'inspirera du professeur de philosophie Georges Palante, pour créer le personnage de Cripure (surnom donné par les potaches par contraction de Critique de la Raison Pure), pathétique héros à l'apparence burlesque dans «*Le Sang Noir*».

Pendant ses écrits philosophiques ne sont pas tombés dans l'oubli: il s'inscrit dans la lignée des Individualistes. Influencé par Stendhal, Nietzsche, Freud, il va à son tour influencer Jean Grenier, Albert Camus et de nos jours Yves Prié et Michel Onfray. (*Physiologie de Georges Palante, portrait d'un nietzschéen de gauche -éditions Grasset-2002 paru en poche en 2005*)

Les oeuvres principales de Palante ont été rééditées récemment par Yves Prié aux éditions *Folle Avoine*. Aux éditions *Coda* sont disponibles les *Oeuvres philosophiques* presque complètes, préfacées par Michel Onfray, en 2004.

Les chroniques parues au *Mercur de France* ou dans *La Revue philosophique* ont été republiées en 2006 et 2009 aux éditions *Coda*.


A noter également: *La sensibilité individualiste* aux éditions *Mille et une nuits*.

Pour en savoir plus:

<http://pagesperso-orange.fr/selene.star/>

<http://www.espacestems.net/document1793.html>

Franjo, Laurent, Amapola, MarieMad



Cours et stages en Lorraine

Cours d'espéranto dans la Moselle (57)

Nilvange :

Cours de langue internationale :

Qu'est-ce que l'espéranto ? Une langue imaginaire ou un vieux patois régional ? Ni l'un ni l'autre : L'espéranto est une langue internationale, qui initiée il y a plus de 120 ans, ne cesse de se développer par son vocabulaire et sa littérature et dont le nombre de locuteurs ne cesse d'augmenter. Sa diffusion touche maintenant tous les continents. La connaissance de l'espéranto ouvre donc les portes de la plupart des pays du monde. Mieux encore : cette langue peut s'apprendre ici, dans la vallée de la Fensch et s'y pratiquer car des espérantophones de tous pays viennent visiter la vallée. L'apprentissage de l'espéranto exige huit fois à dix fois moins de temps que celui de l'anglais ou de l'allemand. Même, ses qualités propédeutiques permettent d'apprendre plus facilement les autres langues car l'on y trouve des racines des principales langues européennes mais avec une grammaire plus simple.

Le cours a lieu de 20H00 à 21H30 au Centre Socioculturel Albert Camus de Nilvange les 1er et 3ème mercredis de chaque mois.

Un stage aura lieu aussi au printemps (du 12 au 16 avril 2010) :

L'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto et Espéranto-Thionville organisent ce 2ème stage en Lorraine au pays des trois frontières pour faire découvrir cette langue logique et facile d'intégration, mais aussi pour permettre à ceux qui en ont déjà l'usage de se perfectionner. Au programme, 5 jours dans une belle demeure confortable du 19ème siècle située dans un très beau parc pour apprendre à communiquer avec le monde entier et la possibilité, au terme de ce premier stage, d'en faire un second en République tchèque.

Des cours d'espéranto pour petits et grands avec à la clé film vidéo, découverte du patrimoine régional, une conférence d'André Cherpillod sur le problème des langues en

Europe et sa solution et beaucoup de conversations.

Restauration et hébergement à prix très modérés.

Ce stage est ouvert à tous les publics.

Renseignements :

03 87 73 95 57
esperanto-thionville@laposte.net
<http://www.esperanto-thionville.asso.fr/>

contact :

HENRY Bruno
8 rue Pasteur
FR-57240 NILVANGE
+33 (0)3 82 53 25 47
bruno.henry.esperanto@gmail.com
Marcel Redon, marsim@wanadoo.fr

Thionville :

ESPERANTO-THONVILLE
<http://www.esperanto-thionville.asso.fr/>

Cours d'espéranto dans les Vosges (88) :

Le Tholy :

contact : Robert Colin, 03 29 61 83 27

Jules Verne, espérantiste...

Lionel Dupuy, auteur du livre Jules Verne espérantiste ! édité lors du congrès de SAT-Amikaro à Pau, vient de soutenir avec succès sa thèse sur le thème : «Géographie et imaginaire géographique dans les Voyages Extraordinaires de Jules Verne : Le Superbe Orénoque (1898)». La thèse est consultable en ligne à l'adresse : http://pagesperso-orange.fr/jules-verne/These_Lionel_Dupuy.pdf

Nous adressons bien sûr toutes nos félicitations à Lionel Dupuy. Ceux qui veulent le faire actuellement peuvent lui écrire à lionel.dupuy@univ-pau.fr

A cette occasion SAT-Amikaro va procéder à un nouveau tirage du livre qui est déjà épuisé depuis quelques semaines.

Cette réédition sera accompagnée de celle de deux autres ouvrages connaissant un bon succès : «La itala socialismo kaj Esperanto» de Antonio Gramsci, et «La Pariza Komunumo de 1871» ouvrage collectif sur la Commune de Paris.

...et autres.

♦ **La Voix du Nord** publie le 04 décembre un article intitulé **Espérantiste, Richard Valet s'est mis à l'écriture et a publié son premier roman, « La Boucle »**.

Engagé, Richard Valet l'est au sens noble du terme. Conseiller municipal, ce qu'il cherchait, il l'a trouvé à Bersée : la campagne mais aussi « une vie associative intense ». Club photo, comité de lecture de la médiathèque et, surtout, le club d'espéranto où il a appris la langue créée à la fin du XIXe par Zamenhof pour faciliter la communication entre les personnes à travers le monde. « C'est la clef qui nous a permis d'entrer en contact avec des tas de gens, de visiter plein de pays », explique celui qui « se balade pas mal avec sa caravane ». De l'Europe de l'est à la Finlande en passant par l'Afrique, le Mexique et le Japon, les Valet ont multiplié les rencontres et les échanges de correspondance. «En apprenant l'espéranto, je me suis aperçu



que je faisais rapidement des progrès et je me suis mis à écrire des petits textes jusqu'au jour où je me suis dit «Pourquoi pas en français?» » D'abord un « petit bouquin » sur ses souvenirs d'Algérie. Puis un autre plus romancé, *Le Foulard bleu*, suivi par l'histoire de son père, *L'Indomptable*. L'écrivain ne pouvait s'arrêter en si bon chemin, relatant ensuite les souvenirs de son grand-père et d'un oncle pendant la Grande Guerre. Aujourd'hui, la fibre romanesque l'a emporté. « *La Boucle*, ce sont des événements similaires qui se reproduisent à des époques et dans un contexte différent », précise-t-il. Mais l'écrivain a une autre idée qui lui trotte dans la tête : « De l'aventure toujours, mais au temps de Louis XIV et dans les Ardennes, une région où on va en vacances depuis toujours... »

Extrait de l'article de Jean Bischoff



Google - 15 décembre 2009 - 150e anniversaire de Zamenhof

Le moteur de recherche Google célèbre le 15 décembre 2009 le 150e anniversaire de la naissance de l'auteur de l'espéranto, Zamenhof, en adoptant pour l'occasion un «Doodle» arborant le drapeau vert des espérantistes sur sa page d'accueil dans de nombreuses langues (une trentaine), dont le français, le japonais, l'allemand, le russe, le chinois, l'espagnol, etc.

Le lien hypertexte correspondant mène vers la page de résultats de la recherche pour : LL Zamenhof l'espéranto (environ 111 000 pages de résultats...).

♦ Tribune de Genève

L'inventeur de l'espéranto naissait il y a 150 ans

ANNIVERSAIRE | Google rend hommage aujourd'hui à Louis Lazare Zamenhof, le médecin polonais qui a établi les bases de l'espéranto, un projet de langue internationale destiné à réunir les peuples.

C'est le 15 décembre 1859, il y a exactement cent cinquante ans, à Białystok, au Nord-Est de la Pologne, que naissait Ludwik Lejzer Samenhof. Cet homme issu d'une famille de confession juive deviendra médecin et ophtalmologiste. Mais très vite, le jeune Samenhof se passionne pour les langues. Il pratique lui-même le yiddish, le russe et le polonais. Dans sa région natale, plusieurs nationalités et diverses confessions cohabitent non sans heurts. L'idée lui vient donc de créer une «passerelle linguistique», censée permettre à des gens très divers de mieux communiquer, ceci dans le but de nouer des relations constructives.

Celui dont le nom a été francisé en Louis Lazare Zamenhof va donc créer une grammaire et une syntaxe, une véritable langue, en fait, l'espéranto, aujourd'hui pratiquée par un à deux millions de personnes dans le monde.

♦ 24 heures

Google rend hommage à l'inventeur de l'espéranto

Internet | Sur sa page d'accueil, le moteur de recherche fête le 150e anniversaire de la naissance du médecin ophtalmologiste polonais Ludwik Lejzer Zamenhof, né le 15 décembre 1859.

Décédé le 14 avril 1917, Ludwik Lejzer Zamenhof, alias Doktoro Esperanto (le docteur qui espère), est mondialement connu pour avoir inventé une langue internationale pratiquée aujourd'hui par environ un million de personnes à travers le monde.

En créant son propre langage, Ludwik Lejzer Zamenhof espérait faciliter le dialogue entre personnes de langues différentes.

♦ Web-Libre.org

LL Zamenhof l'espéranto l'anniversaire Zamenhof, le créateur de l'espéranto, est célébré par Google. En effet, la page d'accueil du moteur de recherche aujourd'hui est dédiée à l'inventeur de la langue qui devait être un langage universel. The Big G dédicace à Zamenhof son propre logo aujourd'hui, 150 ans après sa naissance.

Google décide souvent de changer sa page d'accueil en l'honneur des événements, des célébrités, des occasions spéciales. Aujourd'hui le temps est venu pour Zamenhof. Ont précédé à la commémoration de l'inventeur de l'espéranto par Google, la découverte d'eau sur la lune, le jour anniversaire de la naissance de l'inventeur du code Morse ou encore des phénomènes «paranormaux» comme les crop circles.

Aujourd'hui, c'est donc le 150e anniversaire de la naissance du juif polonais Ludwik Zamenhof Lazar, créateur de l'espéranto. L'espéranto permet la communication entre des personnes de langue différente.

Il a été présenté pour la première fois en 1887 et depuis lors, est né un mouvement international qui promeut son utilisation. L'Espéranto est largement répandu et utilisé principalement en Scandinavie, Europe de l'Est et au Brésil, mais aussi dans d'autres pays.

C'est une langue « artificielle » inventée pour être utilisée au niveau international comme un moyen complémentaire pour communiquer entre peuples de langues différentes.

Après Zamenhof quel sera le prochain événement à apparaître dans le logo Google? On ne peut pas le savoir à l'avance, puisque le secret sur le logo google est toujours bien gardé !

♦ Désinformations.com (Satire)

L'espéranto : «un danger pour l'identité nationale» selon Eric Besson

L'espéranto est né il y a 150 ans grâce à LL Zamenhof. Plus précisément le

docteur Ludwik Lejzer Zamenhof est né il y a 150 ans, le 15 décembre 1859. Eric Besson, ministre de la traîtrise banalisée et des vols charters pour l'Afghanistan, traversé d'un trouble problème d'identité depuis qu'il est passé du parti socialiste à l'UMP et a même dû chanter en play back un hymne à la gloire des jeunes de l'UMP, a aussitôt voulu éviter une éventuelle hémorragie d'espoir : «non, l'espéranto n'est pas le bienvenu en France», a-t-il asséné devant nos caméras. Mais pourquoi ?

De sources bien désinformées, l'espéranto est une langue construite conçue à la fin du XIXème siècle par Ludwik Lejzer Zamenhof dans le but de faciliter la communication entre personnes de langues différentes, à travers le monde entier.

Zamenhof publia son projet en 1887 sous le nom de Lingvo Internacia («Langue internationale»), sous le pseudonyme de Doktoro Esperanto («Docteur Espérant», «Docteur qui espère»), d'où le nom sous lequel la langue s'est popularisée par la suite. Tout est dit : le projet perfide du non moins perfide Docteur Zamenhof visait à faciliter l'arrivée massive de clandestins illégaux...

On notera que le Docteur Zamenhof a poussé le vice jusqu'à faire franciser son nom, histoire de mieux se fondre dans la foule et de promouvoir son arme de déstabilisation massive, l'Espéranto. Son nom original était Samenhof, et il le fit franciser en Louis Lazare Zamenhof. Personne n'est évidemment dupe. Il ne pouvait masquer aux autorités qu'il était surtout un médecin ophtalmologiste polonais, donc jouant à fond sur le dumping social. Il ne pouvait masquer davantage sa confession juive, ce qui n'est pas catholique, sa pratique du yiddish, du russe et du polonais.

Jugé par le Tribunal du Maintien de la Souche (TMS) pour tentative de trouble de l'équilibre démographique français par l'introduction de l'Espéranto susceptible de diluer nos frontières, il fut condamné à mener seul une contre-offensive sur le front allemand, et fut sainement massacré le 14 avril 1917.

ESPERANTO ARMOR 2010



65^a KONGRESO de SAT-amikaro



Coucou, amis de l'espéranto,

Vous rappelez -vous qu'un groupe d'irréductibles espérantistes bretons vous a donné rendez-vous du 3 au 6 avril 2010, à Hillion, petit village breton, situé à côté de Saint-Brieuc au nord de la Bretagne ? Ensemble, nous échangerons sur les actions possibles pour sortir des crises actuelles. Pour cela, en alternance avec les débats consacrés au fonctionnement de SAT-Amikaro, nous suivrons les traces d'un écrivain local, Louis Guilloux dit « l'insoumis » pour réfléchir et débattre sur des questions d'actualité (la qualité de l'eau en Bretagne et ailleurs, l'avenir des abeilles, les crises économique, sociale...).

Agir contre les crises, c'est aussi prendre du plaisir ensemble: pour cela, nous vous initierons aux danses et chants bretons le samedi soir (bonne humeur garantie...), nous partagerons plein d'émotions en écoutant les concerts des soirées du dimanche (guitare classique et le Canto General par la chorale espérantiste Interkant') et du lundi (piano et comédie musicale).

Et bien sûr, nous ne vous laisserons pas partir sans vous faire découvrir quelques jolis coins de notre région (baie et ville de Saint - Brieuc, Dinan et ses ramparts, la vallée de la Rance, la côte de granit rose, le château de la Roche Jagu etun vrai village gaulois.....), tout cela, toujours dans la bonne humeur.

Vous voilà convaincus de la nécessité de participer à cet événement? Alors, reprenez vite le numéro 60 de « la Sago » pour en savoir plus et renvoyer rapidement votre bulletin d'inscription.

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Judi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: libroservo@sat-amikaro.org

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol
75013 Paris
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.
Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.
Dépôt légal à parution.

La Sago 61 - Janvier 2010.

Espéranto
vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-horoj	Marde	10h00 - 16h00
	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Triagrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio : 3,80 F.S.; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil,

Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Retpoŝt-adreso: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Retpoŝt-adreso : claud.gerlat@orange.fr

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Féés 74330 Sillingy Retpoŝt-adreso : lasago@free.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Atentu !

La redakta ret-adreso de La SAGO ŝanĝiĝis al **lasago@free.fr**

Kiel traduki Façon

La franclingva vorto **façon** havas diversajn signifojn; la plej oftaj tradukoj estas **fasono** kaj **maniero**, sed kelkfoje aliaj vortoj pli konvenas, ekzemple **prilaborado**, **ĝeno** aŭ **afektado**.

♦ En unua grupo mi metas la ekzemplojn, en kiuj **façon** signifas laboron, per kiu oni donas formon al iu materialo. Se temas pri vestaĵo, la traduko estas **fasono**, sed en la ceteraj kazoj oni devas uzi alian vorton, interalie **prilaboradon**. La vorto esprimas ankaŭ la rezulton de la prilaborado, do la formon de la produktita objekto; ankaŭ tiam ĝi tradukiĝas per **fasono**.

J'ai payé 30 € pour le tissu et 40 € pour la façon. **Mi pagis 30 € por la ŝtofo kaj 40 € por la fasono.**

Voici une robe dont la façon est démodée. **Jen robo de eksmoda fasono.**

Ce livre a une reliure façon cuir. **Tiu libro estas bindita en leda fasono; ... en leda imitaĵo.**

L'artisan qui travaille à façon ne fournit pas la matière première. **La metiisto, kiu prenas sur sin nur la prilaboradon, ne liveras la krudmaterialojn.**

Donner une seconde façon à un champ. **Surplugi kampon.**

♦ En la plej granda grupo da ekzemploj troviĝas la signifo **maniero**, kiu iafoje tradukiĝas ankaŭ per iu tabelvorto kun la finaĵo **-el**, kiu esprimas la manieron:

C'est bien une idée de sa façon. **Tio ja estas ideo en lia maniero.**

Il lui a joué un tour de sa façon. **Li mistifikis ŝin siamaniere.**

Il y a plusieurs façons de procéder. **Estas pluraj manieroj de agado.**

C'est sa façon d'arranger les affaires. **Tio estas lia maniero aranĝi la aferojn.**

C'est une façon de parler. **Tio estas nur dirmaniero.**

C'est une façon de voir. **Tio estas nur vidmaniero.**

Sa façon de parler m'agace. **Lia parolmaniero incitetas min.**

Nous devons faire de cette façon. **Ni devas fari tiel.**

De quelle façon espérez-vous y parvenir? **Kiel vi esperas sukcesi?**

De toute façon, vous n'y arriverez pas. **Ĉiamaniere vi ne sukcesos.**

Elle s'est placée de façon à être vue. **Ŝi lokis sin tiel, ke ŝi estu vidata.**

S'arranger de façon que tout soit prêt. **Elturigi tiel, ke ĉio estu preta.**

Il se comporte de telle façon qu'il n'a pas d'amis. **Li kondutas tiel, ke li ne havas amikojn.**

Il travaille à la façon d'un professionnel. **Li laboras en la maniero de profesiulo.**

Il veut vivre à sa façon. **Li volas vivi siamaniere.**

Je vais vous raconter son histoire à ma façon. **Mi tuj rakontos al vi lian historion en mia maniero.**





LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoĵ
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40 % ĝis 5€
 35 % ĝis 10€
 25 % ĝis 20€
 20 % ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00


Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Edistudio eldonas !

Diabolik : La reĝo de la teroro

Prezo: 6,00 €
 16 x 22cm 144 p.



La bildstrio, fariĝinte artoformo, postulas sian spacon apud la romano: la Esperanta kulturo riĉiĝas, tra tre prestiĝa volumo, per Diabolik, rolo naskita de la renkonto de la ĝenroj.

La Ĵurnaleto de Joĉjo Tempesto



Vamba (Luigi Bertelli), Traduko: Umberto Broccatelli

Prezo 18,00 €
 16 x 22 cm; 244p.

Atingas nun la tutan mondon, per siaj jam famaj petolaĵoj, Johaneto Stoppani alinomita Joĉjo Tempesto... Per la

senpeka traduko de Umberto Broccatelli kaj per la malavara disponigo de la originala eldonisto, kiu permesis la represon de la originalaj desegnoj de la aŭtoro, kiuj de ĉiam akompanas tiun ĉi porknaba libron, kiun ankaŭ la plenkreskuloj volonte (re)legos

Lingvaj aspektoj de Esperanto



Bruno Migliorini
 Prezo 18,00 €
 15 x 21 cm; 112 p

La ĉefa itala lingvisto de nia jarcento estis serioza esperantisto, kies kolekto de eseoj pri la internacia lingvo, dise aperintaj en italaj kaj tutmondaj revuoj, aperas ĉi-tie. Jen 2a eldono, kompletigita.

En aucune façon. Tute ne; neniel.

De quelque façon il s'en sortira. Iel, li elturniĝos.

♦ La lasta grupo rilatas al **sinteno**, sed la tradukoj estas tre diversaj, laŭ la nuancoj subkomprenitaj en la franclingvaj frazoj:

Il a de curieuses façons. **Li havas strangajn manierojn.**

Il a des façons engageantes. **Li havas allogajn manierojn.**

Ne faites pas tant de façons. **Ne tiel ĝenu vin.**

Il fait beaucoup de façons. **Li tre afektas.**

Une réception sans façon. **Senceremonia akcepto.**

J'accepte sans façon. **Mi akceptas senĝene.**

Non merci, sans façon. **Ne, dankon, senĝene.**

Les vrais grands hommes sont sans façon. **La vere grandaj homoj estas senafektaj.**

♦ Konklude jen speco de malvorto (aŭ antonimo), **contrefaçon**:

La contrefaçon de créations de haute couture. **La ŝtelkopio de altmodaj kreaĵoj.**

L'achat de contrefaçons est illégal. **La aĉeto de ŝtelkopioj estas kontraŭleĝa.**

Andreo Andrio

La juĝo de Pariso

El la opero de J. Offenbach

«La bela Heleno»


Tekstoj de

H. Meilhac k L. Halévy

Au mont Ida, trois déesses se querellaient dans un bois quelle est, disaient ces princesses

La plus belle de nous trois ?

Evohé, que ces déesses pour enjôler les garçons
Evohé, que ces déesses ont de drôles de façons !



kiu plej belas ?
 el ni tri, ja mi !

Ĉe ldao-Monto, tri Dilnoj
 Kverellis en arbareto
 Kiu estas, vortis tiuj Prncinoj
 La plej bela el ni tri ?

refreno

Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 Por delogi knabojn,
 Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 havas strangajn manierojn

lom da kulturo. Evohe estas salut-krio de la bakchantinoj al Bakho.

Ĉi-atbarete paŝas bela knabo,
 Bela knabo freŝa kaj linda
 Lia mano entenas pomon,
 Nu, imagu la scenon...

(Jen mi !)

Ha, Hola, he ! Bela knab',
 Bela knab', haltu do vi,
 Kaj la pomon donacu
 Al la plej bela el ni !

Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 Por delogi knabojn,
 Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 havas strangajn manierojn

Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 Por delogi knabojn,
 Evohe ! Tiuj Dilnoj,
 havas strangajn manierojn

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatemp, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Karuseloj



Sara Larbar, originala romano, eld. G. Ledon, Brazilo, 1987, 116 paĝoj, 6,25 € en la libro-servo de SAT-Amikaro. (ĉipa prezo, ĉu ne?!)

Gilbert R. Ledon, en siaj «Notoj de la eldonanto» prezentas la verkon de sia

filino – ja Sara Larbar estas la pseŭdonimo de Lilia Ledon da Silva.

«Originala verko en Esperanto. Amromano, kiu de realismo al surrealismo, portas nin kaj la rolulojn de mistika fantazio al kruda realeco. Ja en la karuseloj de nia vivo, per la aparta kapablo de niaj mensoj, ne estas limoj inter la fantaziaĵoj kaj realaĵoj

de niaj senso-sentoj, sintenoj kaj agadoj. Ĉion ĉi tion Sara al ni pruvas en ĉi tiu beletraĵo, kie nia lingvo Esperanto sub ŝia plumo atingas la maksimuman esprimforton kaj flekseblecon, kiujn nur denaska Esperanto-uzanto povas doni (*sed tamen tio ne mahelpas kelkajn maglataĵojn, ekzemple: «kiel se ŝi estus» anst. «kvazaŭ ŝi estus»...*), helpe de escepta, persona verk talento.

Se Sara ne estus konfesinta sian denaskan esperantistecon, ŝia verko perfidus ŝin, ĉar oni daŭre sentas en ĉi tiu romano, ke nur homo, kiu ĉe lulilo cicumas en Esperanto, tiel kapablas esprimi sin...» (*Aĥ! la patra amo...*).

Jen nun, kion mi skribis en LKK-46 de 1988:

«Post «Ombro sur interna pejzaĝo» de Spomenka Ŝtimec kaj «Adolesko» de Blazio Vaha, jen en tiuj tri lastaj jaroj la tria

verko, kie esperantisteco tute normale ŝprucas de paĝo al paĝo. Tri libroj, tri stiloj, du virinoj, unu viro. El la tri, Sara ne estas la plej facila. Ĉu fantazio estas reala? Ĉu realeco estas fantazia? Kiel amo, kiun spuras la aŭtoro tra la paĝoj, nenio ŝajnas palpebla por neinicito. Sed ankaŭ «En ŝia vera karuselo ne estis konkludoj. Ne estis absolutaj nek relativaj venkoj. Estis nur sent-subtilecoj nenomeblaj kaj nepriskribeblaj, kiuj plenigis koron kaj memoron, kaj kiuj sufiĉis, kiuj plene sufiĉis al ŝi. Kaj al... li.» Dudek jarojn post tiu recenzo, kaj post relegado de ĉi romano, mi konfirmas, ke *Karuseloj...* ne estas «facila» libro, ke, kiel ĝuste diras Gilbert R. Ledon, ni iras tra ĝi de realismo al surrealismo, ke tio ne estas kutima en nia esperanta beletro, kaj tial mi forte konsilas vin ĝin legi.

Jak Le Puil

Jen ekstrakto, de la paĝo 36:

Eĉ antaŭ ol diplomiĝi ŝi jam estis laboranta ĉe regiona filio de aĉa komerca televido. Ŝi tie estis ŝimanta kaj langvoranta de du-tri jaroj. Vizito al Esperanto-grupo en Brazilo tute hazarde konatigis ŝin kun De l' Floroj, Diogo kaj aliaj... Kaj ĉio subite akceliĝis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi estis tuj dungita ĉe ilia kinematografi-entrepreno, kies sidejo estis translokiĝanta en ŝian propran urbon kaj kiu baldaŭ trovis esperantistan produktoron, nome Kirinon, ankaŭ por televid-programoj. La intenco estis profesie labori kun la plej granda nombro ebla da profesiaj

esperantistoj; kiam mankis verdaj – kvankam maturaj – homoj, oni esperantigis per devigaj kursoj dum laborhoroj la dungitajn profesiulojn, kiel kameraistojn, teknikistojn ĉiufakajn... Eĉ la virino de la kafo tre rapide kapablis demandi ĉu oni preferas kafon aŭ teon en Esperanto, kun akuzativoj kaj ĉio; ŝi amuzis ĉiujn kiam ŝi prezentiĝis dum leciono kiel «kafetino», laŭ tute persona vort-kunmetado; ĉu ŝi finfine ne estis la «ino de la kafeto»? La regulaj klientoj, t.e. reklamistaro de la televizi-produktaĵoj kaj liveristoj ĉiuspecaj, surprizige iom post iom tiom impresiĝis pri la neordinareco de esperanto-

uzado en komerca, normala medio, ke eĉ ili neniam perdis la okazon saluti en la internacia lingvo, peti ke oni informu al ili kiel oni diras tion aŭ jenon (ĉefe fivortojn aŭ amdeklarojn) en Esperanto... Frandinda, ĝiskerne frandinda iniciato. Unu tagon oni bezonis fotiston por specialaj propagand-flugfolioj. Helio prezentiĝis. Silvana ne estis vidinta lin de post la epoko de la fakultataj studoj. Al kreiva laboro sufiĉe bone mone kompensita, al ĝojo vivi ĉiutage malutopiigadon de tiu kara, karega Esperanta revo, aldoniĝis fulma, delira, fantasta, reciproka enamiĝo.

Mi ĵus eksciis ke nia kamarado Modesto Ramelli mortis la 4an de novembro. Li estis 87 jaraĝa. Li loĝis en *Château Saint Germain (Moselle)* apud Metz. Li respondicis pri filatela servo. Instruis Esperanton en *Montigny les Metz* kaj

Metz Nord. Vojaĝis kun siaj lernantoj en Italio kaj Ĉekio. Partoprenis en SAT-kongreso en *Straznice* en 1994. Organizis prelegon de *Leo Vulfoviĉ* el Moskvo en *Montigny les Metz* en 1995. Helpis min en la 57a SAT-Amikara

kongreso en *Vigy (Moselle)* en la jaro 2002. Skribis artikolojn en "Laŭte!". De tempo al tempo vizitis la klubojn de Metz kaj *Thionville*. Li estis tre aktiva.

Komunikis K-do Bruno Henry



La 25an de aprilo, dum furoris la eŭropunia balot-kampanjo, Jakvo Schram estis invitita de la sekcio de la 13a distrikto de Parizo de la Franca Komunista Partio por prelegi pri Internacia Solidareco. La prelego okazis dulingve, ĉar Jakvo esprimiĝis en Esperanto. Li intervenis kiel iama sindikatisto de la antverpena diamant-industrio, kaj raportis proprajn spertojn

pri bataloj fronte al mastroj diversnaciaj, kaj uzantaj diversajn ekspluat-metodojn. Li ankaŭ ne prisilentis la problemojn pri rasismo kaj koruptiteco ene de sindikataj organizoj, kaj konklude emfazis la gravecon por la laboristaro pensi kaj organiziĝi mondscale. La prelegon sekvis sufiĉe longa debato, en kiu opinioj esprimiĝis en respektama kaj aŭskultema etoso. La ĉeestantaro -

duone esperantista, duone komunista - estis relative malabunda, interalie pro konkurenco de samtempaj «amasaj iniciatoj», sed la ĉeestintoj kontentis pri la lernitaĵoj. Pluraj pli poste reparolis al mi pri la kunveno, substrekante sian kontenton ion lerni pri laboristaj vivkondiĉoj en najbara sed ne tiom bone konata lando.

Vinko Markovo

Liono (69)

Vizitante la liberecanan librejon «La Gryphe», serĉante libron pri historio de materiismaj filozofioj, mi neatendite trafis surbrete kelkajn konatojn. Ne tiom surprize troviĝis la franclingva eldono de «la Universalismo» de Djemil Kessous (kies esperanta versio estis eldonita de SAT en 2002). Iom malpli atendite, mi trovis antikvaĵojn de Lucien Laurat, prezidinto de la fondkunveno de SAT: *Déchéance de l'Europe: capitalisme et socialisme devant l'héritage de la guerre*. Temas pri analizo de la mondaj politikaj kaj ekonomiaj perspektivoj, el vidpunkto de franca socialisto en 1948. En ĝi tute ne temas pri Esperanto. Tamen la plej lasta frazo indas je citado:

«Ni povos nenion fari en Eŭropo sen potenco kaj aktiva kunlaboro de la usonaj socialisma kaj sindikatisma movado - la internacia solidareco de la laborista mondo, ĉi tiu malnova socialisma principo, pli kaj pli iĝas monda solidareco.»

Tamen plej surprizis min la apero, en la gazetara angulo, ne nur de la oktobra numero de la SAGO, en sufiĉe videbla loko, sed ankaŭ de 28-paĝa broŝuro titolita «Kio estas CNT? Kio estas anarko-sindikatismo?» Ĝin ŝajne eldonis Tuluza sekcio de la CNT-AIT, ŝajne kiel unuan titolon en ĵus ekigita «Esperanto-kolekto». Ĉi tiu broŝuro estas kompilaĵo de prezentotekstoj pri la franca Nacia Konfederacio de Laboro, pri ĝia hispana samnomulo, kaj pri la Internacia Laborista Asocio, al kiu ambaŭ apartenas. Aldoniĝas al tio kelkaj kantotekstoj (Al la barikadoj, Maĥnovŝĉino kaj La dizertonto) kaj Ekrigardo al la anarkiista partopreno en la esperantista movado, de Ronald Creagh kaj Karine Tourraton. Malgraŭ la bedaŭrinda svarmo de preseraroj (espereble korektotaj en dua eldono) - jen bonvena propagandilo!

Vinko Markovo

Esperantistoj aktivas

En *Montresor* [Montrezor], sud-oriente de Turo ĉe la bordo de la rivereto *Indrois*, departemento *Indre-et-Loire* (37), la 27an de Junio 2009, la esperantista grupo de Turo (*Centre Culturel Esperanto Touraine*) akceptis la najbarajn grupojn por inaŭguri novan ZEOn en la ĉeesto de la urbestro *Jean Moreau*.

Tiu ZEO, 4,20 m alta, konsistas el du partoj : granda kvinpinta stelo, verde farbita, sur kiu oni povas legi «Esperanto Internacia Lingvo». La diametro mezuras 3,40 m. La stelo estas movata de akvo provizita per batpumpilo. La stelo movas la duan parton : la karuselo. Ĝi konsistas el terglobo, 80 cm diametra, salutata de 5 uloj, kiuj ĉirkaŭas ĝin.

Genia metiisto, *Guy Guetault* [Gi Geto], ano de la esperantista grupo de Turo, elpensis kaj fabrikis tiun ZEOn.

La esperantista grupo de Turo .

ZEO=Zamenhof-Esperanto-Objekto.

Parizo (75)

La unuan de majo, deko da esperantistoj ĉeestis rande de la kutima sindikata manifestacio. 2000 flugfolioj de SAT-Amikaro estis disdonitaj, kaj la stoko elĉerpiĝis preskaŭ tuj post la fino de la pasado de CGT-anoj, dum pluraj aliaj sindikatoj kaj organizoj ankoraŭ ne preterpasis nin. Ankaŭ vendiĝis kelkaj broĉoj, kaj sufiĉe multaj entuziasmoj petis de ni glumarkojn. Eĉ pli kuraĝige, almenaŭ unu preterpasanto, tute nekonata, alparolis nin rekte en Esperanto, kaj pluraj venis rekte ne por informiĝi pri Esperanto, sed pli precize por scii kie kaj kiam eblas ĝin lerni. Ŝajnas do, ke kelkaj el la grenoj semitaj dum pasintaj aranĝoj iom post iom ĝermas. Plie, iu sindikatisto venis al ni por klarigi, ke esperanton li konas kaj komencis lerni post kiam kolego lia, laboranta en la imposta administracio, transdonis al li flugfoliojn. Indas tamen atentigi, ke ni ĉi-jare mistradis la eblecon propagandi ankaŭ matene dum la manifestacio de la liberecanoj, ĉar mankis homfortoj por kunporti la materialon.

Vinko Markovo

SAT-Amikaro, kune kun «Langue Espéranto 64» pliafoje starigis budon okaze de la la Paŭa manifestado «Pau fête le livre» («Paŭo festas la libron»). Jarojn jaroj sekvas, tamen ne similas, ĉefe ĉar ĉi jare, ĝi okazis en la prestiĝa «Palais Beaumont».

Ekde la pasinta jaro, la vizito estas senpaga, kio pligrandigas la nombron da vizitantoj. Plie, ĉar oni organizis vizit-planon, ĉiuj

vizitantoj pasis antaŭ nia budo. Multaj interparoladoj kaj vendado de Eo-libroj por iom pli ol centoj da eŭroj konsistigis la sukceson de tiu agado. Tiun sukceson oni ja ŝuldas al la deko da esperantistoj kiuj laŭvice stafete deĵoris dum la tri tagoj.

Informas Frederiko Scibor

Paŭo (64)



Thionville (57)



Espéranto-Thionville en Forumo de la asocioj.

La 17an de oktobro 2009 nia asocio Espéranto-Thionville starigis budon kaj ekspozicion en la forumo de asocioj «Bien vivre son temps libre». Tiun forumon organizis la municipo de Thionville en tendego, placo André Malraux.

Centoj da personoj vizitis ĝin kaj 70 asocioj prezentis siajn agadojn. Marie-José, Bernard, Raymond, Antonio kaj Bruno deĵoris.. Ni disdonis 300 flugfoliojn kaj 100 kalendarojn por Esperanto kun informoj pri niaj kursoj kaj printempa staĝo en Nilvange, kiu okazos de la 12a ĝis la 16a de aprilo 2010. Kelkaj personoj ŝatus lerni Esperanton en Thionville. Ni pripensas organizi tiun kurson en la kvartala domo Jacques Prévert en januaro 2010. Personoj aŭdis pri Esperanto, kelkaj vidis artikolojn en la regiona ĵurnalo «Le Républicain Lorrain» pri nia agado. Do, ni semadas kaj poste ni kolektos fruktojn!

Informas Bruno Henry

esperanto-thionville@laposte.net - <http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

Ĉirkaŭ la kongreso de Hiliono



Vagado sur la rozgranita marbordo.

de dissemataj rozgranitaj kaosoj, la pado de la doganistoj estos nia ruĝa fadeno. Laŭlonge de la marbordaj kilometroj, ni malkovros malgrandajn krekojn sed ankaŭ grandajn plaĝojn.

Baldaŭ aperas «Le Château du Diable» (kastelo de la Diablo) grandega granita roko, sur kiu frakasiĝas la ondoj. Ĉi tie la Homo estas nur polvo fronte al tiu spektaklo, skulptita de la vento, de la maro kaj de la ŝtormo.

Ene de simfonio blua, rozkolora kaj verda, ni daŭrigas nian promenadon ĝis **Ploumanac'h** (bretone: Poul manac'h: marĉeto de la monaĥo) unu el la plej surprizaj Armorikaj lokoj. Laŭ la legendo, dum la 6a jarcento, tien surteriĝis la kimria monaĥo «**Saint Guirec**» (Sankta Girek').

Jen meze de granita cirko, la golfeto de **Pors Kamor**, kiu ŝirmas «la sav-boaton», kaj fronte al la maro, meze de rokgranita disfalaĝo staras la lumturo.

La unua datiĝas de 1860, sed la germanaj soldatoj detruis ĝin en 1944. Post la milito, oni rekonstruis alian pli modernan, kiu aŭtomate funkcias. Ĝi lumigas ĝis 40 kilometroj ĉirkaŭe.

Sur alia malgranda plaĝo staras stranga monumento: **la Oratorio de Sankta Girek'**. Junulinoj, ek al viaj pingloj! ĉar, laŭ la legendo, la junulino, kiu sukcesas planti pinglon en la sanktulan granitan nazon, edziniĝos dum la nuna jaro!

En malgranda kapelo (14a j.c.), proksime de la plaĝo, oni ŝirmis la antaŭan lignan sanktulon (kiu ne plu havis nazon!)



Montresor (37)



La «**Côte de Granit Rose**» estas zono de marbordo, departemento «Côtes d'Armor», norde de Bretonio. Ĝi etendiĝas 30 kilometrojn longe sur la regiono «Le Tregor».

Perros-Guirec (bretone Penn-Roz: supro de teramaso) estas grava banloka urbo de tiu marbordo. Ĝi prezentas, meze de escepta ĉirkaŭaĵo, naturan spacon, kie la tero kaj la maro interpenetriĝas.

Ĝi posedas du emblemojn: floro (Hortensio) kaj birdo (fraterkulo). Tie naskiĝis la famulo: *Thierry Le Luron*.

De Perros-Guirec, tra Ploumanac'h kaj Tregastel, vi laŭiros mirindan marbordon karesatan de marbrizo. Sur la erikejo, meze

Vagado sur la rozgranita marbordo (plu)



Fronte al la plaĝo estas la malgranda insulo: «**Costaeres**» (bretone: Koz Seherez, malnova sekigejo) ĉar, ĉi tie, la maristoj sekigis la algojn kaj la fiŝojn. Tie, eltirita el iu fabelo, ŝajnas ke giganto starigis kastelon. Vere ja, riĉa, pola inĝeniero konstruigis ĝin kaj tie vivis riĉe kun riĉa polino. Tie, la pola verkisto Henryk Sienkiewicz skribis la historian romanon: «Quo Vadis».

Estas malfacile elŝiriĝi el tiu loko. Iu fascinoseno invadas vian koron kaj menson. Se eblas, venu ĉi tien kaj sidiĝu sur rokon: tie, vesperiĝo fandiĝas en mondfino!

Marvaste elmergiĝas la insularo «**Les sept Iles**» (la sep insuloj) la plej grava birda rezervejo el Francio (40 hektaroj). Ĝi ŝirmas kelkajn 20000 birdoparojn, ĉefe marajn speciojn: mevoj, laroj, suloj, fraterkuloj, hupkormoranoj, longbekaj urioj, ktp... Ŝipe vi povas admiri la birdojn, sed ankaŭ kelkajn grizajn fokojn, kiuj vivas daŭre ĉirkaŭ la insuloj, sed vi ne rajtas surteriĝi.

Nur la insulo «**l'Île au Moine**» (insulo de la Monaĥo) estas vizitebla. Vi povos admiri la Vauban-konstruaĵon, konstruitan en 1720 laŭ ordono de la Reĝo Ludoviko la 15a.

Oni ne povas forgesi, ke tiu edena pejzaĝo estis trifoje makulita de homa mano: petrola disfluo fuŝpentris nian marbordon kaj mortigis multajn birdojn: Torrey Canyon (1967), Amoco Cadiz (1978), Tanio (1980).

Alia strangaĵo inter Ploumanac'h kaj Tregastel: **la vallée des Traouiero**: du stretaj valetoj, kie fluas la rivereto «**Kerougant**» meze de granitaj kaosoj, kie kreskas grandaj filikoj kaj diversaj muskoj.

Ni ne forlasos Perros-Guirec-n sen paroli pri la kapelo «**Notre Dame de la Clarté**». Ĝi staras ene de mirinda vidpunkto sur monteto, kiu superas la regionon. Ĝi protektas la maristojn kaj ĉiujare, la 15-an de Aŭgusto, okazas religia festo memore al la pereintoj.

Alia hereda posedaĵo de Perros Guirec: la **preĝejo Saint Jacques** (Sankta Jako) centre de la urbo, prezentas 2 navojn: unu romanikstila datiĝas de la 12a jarcento, la alia, gotikstila de la 14a.

Ni arigos niajn lastajn fortojn kaj daŭrigos nian promenadon ĝis **Tregastel** (bretone: Treg ar c'hastel, dependaĵo de la kastelo) (tiu kastelo ne plu ekzistas). Jen la **tajda muelilo** (1764) kiu funkciis ĝis 1932.

Ankaŭ ĉi tie la naturo strange bildigis diversajn granitajn formojn.

Baldaŭ ni atingas **l'Île Renote**, kiu antaŭas en la maron: vere, estas nur duoninsulo. Nova promenado, nova pejzaĝo laŭ alta aŭ basa tajdo. Denove la bela kastelo «Costaeres» frontas al ni, meze de sia verda juvelujo. Post la strando **Toul Drez**, ni alvenas al la plaĝo **Ker ar Vir** dorsapogita kontraŭ la malgranda haveno de Tregastel. Ni adiaŭas la lastajn okulsignojn de la granitaj rokoj: la **Tête de Mort** (Kranio de Mortinto) **tas de crêpes** (krespoamaso) **la tortue** (testudo) ktp... kaj, laŭ via propra imago vi malkovros multajn aliajn...

Apenaŭ restas al ni tempo por viziti la maran akvarion, kiu prezentas la lokan faŭnon ene de escepta loko: **le Chaos du Père éternel** (kaoso de la Eternulo).

Aliaj homoj ŝatis la ĉarmon de Tregastel: 2000 jaroj antaŭ nia erao, ili konstruis megalitan tombon: **l'allée couverte de Kerguntuil**, kaj alian grandegan dolmenon, kiu staras proksime.

Ene de la urbo, la preĝejo ricevis multajn ŝanĝojn. Ostarejo de la 17-a jarcento kolektas la sekigitajn ostojn el la tombejo.

Multaj legendoj naskiĝis el tiu mirinda pejzaĝo, sed tio estas alia paragrafo!...

Jeanne Pouhaer.



Foto:
La lumturo de Ploumanac'h
Christophe Marcheux

El Wikipedia,
Creative Commons Attribution 3.0 License

